# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 11/03/2021 Kvincentdudekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 822,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **295,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **244,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **219,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **68,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Kial Esperanto estas lernebla lingvo

### *.Lernado de fremda lingvo postulas*

*Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...*
*Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj..............*
*Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo..........................................*
*Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..*
*Lernu la lokan parolatan lingvon........................................................*
*Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon...............................*
*Lernu la idiomojn de la lingvo ..........................................................*
*Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............*

**Komparu Esperanton**
..Fonetike senescepta
..17senesceptaj reguloj
..Kunmetitaj vortoj
..Unu prononco
..Ne ekzistas
..Ne ekzistas
..Ne ekzistas
..Unu monda lingvo

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estis plenkreskaj.
Do ili estas toleremaj kaj helpemaj al lernantoj *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
https://twitter.com/i/status/1245591199034929153
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato.Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 6a de marto estis la unua sabato. Unu taso da klubpagita kafo atendis vin. Venis Roger Chris Ian kaj John.
Perdiĝis unu de niaj favoritaj lernolibroj "Saluton".
Ni ŝatas tion ĉar ĝi estas helpema por memorigi gramatikajn punktojn kaj ankaŭ bone ilustrita.
Tamen, John faris grandegan serĉadon reten kaj trovis alian kopion.
Ĝojo! denove ni sentas nin kompletaj.
Krom tio , ni legis interesan, nuntempan artikolon: "Ĉu krizo de la urbegoj?"(le monde diplomatique).



Temas pri ŝanĝiĝantaj funkciadoj kaj sociaj efikoj por la urbegoj dum/post la Kovid-19

*Chris Holliss*




AEA fieras anonci ke ni havas novan novaĵleteron, kiu nomiĝas *AEA Informas*. Sendata monate en Esperanto, estas ankaŭ ligilo je la supro por legi en la angla - do estas utila reklamilo kiun vi povas kundividi eĉ kun ne-esperantistoj.
"AEA-Informas" estas kunmetita de nia sekretario Joanne Johns kaj aperas unufoje monate.
**Aboni nun ĉi tie:** http://eepurl.com/hoDIY9
Vi povas vidi niajn pasintajn eldonojn ĉi tie:
**Marto 2021** - Esperanto / Angla
**Februaro 2021** - Esperanto / Angla
Plej amike, La AEA estraro
(*Heather, Joanne, Jonathan, Indrani, Sandor, Terry*)

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Esperanto en altlernejo



En februaro, lingvo-instruisto de Newington College, Stamore (Sidnejo), Julia Gonzales, sendis retleteron al AEA, demandante ĉu iu en la Asocio pretus paroli al klaso de knaboj en gradoj 9 kaj 10, *kiuj jam komencis lerni Esperanton per Duolingo*. Ili studas en nova elekta unu-trimestra kurseto, nomita “Komunumo de Lingvoj”. Mi jese respondis, kaj merkredon, la 3-an de marto, veturis per trajno de Gosford al la lernejo, por fari prelegon.

Post kiam mi alvenis, Julia informis min, ke ankaŭ lernantoj de alia kurseto, “Popkulturo”, kaj kelkaj aliaj instruistoj, venos al la sesio.

La unu-hora prelego respondis al diversaj demandoj, inkluzive de la jenaj: *Kio estas Esperanto? Kiel kaj kial ĝi fondiĝis? Kiel oni povas uzi ĝin? Kiamaniere ĝi estas brila? Kiel sukcesa ĝi estas en la mondo?* La lernantoj (kaj la instruistoj) tre interesiĝis kaj ankaŭ ĝuis rigardi la diversajn librojn kaj revuojn, kiujn mi alportis. Tri knaboj aparte interesiĝis pri la Esperanta Biblio, serĉinte specifajn versojn.

Post la prelego, Julia diris, ke Esperanto eble iĝos plena kurso, se sufiĉaj lernantoj elektos ĝin. Ŝi demandis, ĉu mi mem interesus instrui ĝin. Mi respondis, “Jes, verŝajne.” Kompreneble, mi devus ekscii pli, sed almenaŭ, kiel kvalifikita mezlerneja instruisto, mi laŭleĝe povus instrui tie. Rigardu ĉi tiun spacon!



– Raportis *Jonathan Cooper*, vic-prezidanto de AEA

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

Mi estas preta por la plej malbona, sed esperas por la plej bona. Benjamin Disraeli

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# RESPONDE AL MARC SCHMIDT: NIA EDUKSISTEMO

Dum pluraj jaroj mi instruis en registaraj liceoj kaj ankaŭ dum kvar jaroj en privata, katolika liceo, tiu de la Marist-Fratoj. Mi iomete fanfaronu, ke mi instruis ontan Nobel-premiulon. Ĉu vi povas elpensi kiu tiu estas? (Subsugesto: koncernas la stomakon.)

Mi ankaŭ instruis dum unu jaro en privata, anglikana liceo, enkondukon al pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Ĉe la fino de la jaro la lernejestro - kaj la influaj gepatroj - elektis la francan, la indonezian kaj la japanan por daŭra lernado, sed tute ne Esperanton, kiun ili konsideris esti 'stranga', kvankam miaj studantoj jam dum tiu enkonduka jaro korespondis en Esperanto (plejparte simple, per poŝtkartoj) kun eksterlandaj gejunuloj.

Notinda afero koncerne la Maristojn: kvankam mi havis tiam kiel nun, nenian religion, la liceo tute ne maltrankviliĝis pri tio; la instancoj nur interesiĝis pri mia instrukapablo kaj post kvar feliĉoplenaj jaroj (dum kiuj homo surluniĝis) mi eliris la postenon kiam mia morte malsana patro min bezonis.

Dum miaj jaroj de instruado, estis la alcionaj tagoj antaŭ socia-komunikilo, do sen studanto-persekutado fare de unu al alia. Miaj du filinoj ĉeestis primaran kaj licean lernejojn registarajn kaj poste diplomiĝis en registaraj universitatoj.

Marc: ĉu vi konsideras la finnujan eduko-sistemon, komunista?? "Senkosta edukado por ĉiuj infanoj en registaraj lernejoj" - kaj preskau ĉiuj lernejoj en Finnujo estas registaraj. Kaj Marc, mi amegas mian senkostan bibliotekokarton, kaj utiligas ĝin en kvar bibliotekojn - mi timegiĝas, ke iun tagon pruntepreni de miaj amindaj bibliotekoj ne estos senpaga, ĉar iu privata sistemo proprietos kaj superregos ilin, por eltiri, kompreneble, la necesan profiton.

Mi ĉiam admonas al Roger ne sin indulgi per tiom da politikaj eroj en AE, sed ho ve, ankaŭ mi ne povas nun rezisti: Marc, ĉu vi havas emeritiĝulan pension (*Superannuation*)? Ĉu vi aprobas kaj profitas de *Medicare*? Ili ambaŭ venis al ni dank' al la Laborista Partio.



*Vera Payne*.

# Jen reago al la reago de Marc Schmidt

Mirigas min ke instruisto esprimas tian vidpunkton kian tiun de Marc Schmidt en AE 520.
Unue mi ne bone komprenas la rilaton faritan de Marc inter la ideoj esprimitaj de Marcel kaj Komunismo.
Mi ne komprenas kion oni povas riproĉi al Marx kiam li deklaris en la Manifesto de la Komunista partio en 1848 ke necesas "Senkosta edukado por ĉiuj infanoj en registaraj lernejoj" , sciante ke tiam infanoj ekde la aĝo de kvin laboris en minejoj aŭ sur kampoj kaj tiel endanĝerigis sian sanon por la resto de sia mallonga vivo.
Mirigas min ke li pravigas pli da horoj da studado por infanoj , kiuj jam tro longe sidas sur la lernejaj benkoj . Nia socio malsanas pro tro da sidado ….. sed kiam la gepatroj laboras, iu devas prizorgi la infanojn! Mi ne ŝatus esti la ido de gepatroj, kiuj *pro amo* ne donas al mi la tempon "spiri", esplori la mondon, esplori min mem , kio bezonas longan libertempon .

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Esploro de HILDA ( *Household, Income and Labour dynamics Australia* ) ja konkludas ke persekutado de perfortaj studentoj al malpli fortaj estas pli ofta en ŝtataj lernejoj , sed ĉu prave? Por fari valoran komparon necesas ne nur nombri la eventojn , sed ankaŭ enkalkuli la originojn kaj cirkonstancojn de la studentoj kiel montras Karyn Healy en alia raporto. Privataj lernejoj rajtas elekti la studentojn , ŝtataj lernejoj ,ne.

Mi jam aŭdis tiun argumenton ke la registaro ne kapablus provizi edukadon al ĉiu infano sen la helpo de privataj lernejoj- kiuj tamen ricevas subvenciojn de la ŝtato - en la okdekaj jaroj en Francujo . La kulmino estis la granda manifestacio en 1984 de la gepatroj , kiuj subtenis la privatajn lernejojn kaj kontraŭstaris la leĝon Savary, kies celo estis redukti la financan helpon al tiuj privataj lernejoj. Mi lasas ĉiun havi sian opinion pri tiu temo.

Fine mi dirus ke la finnlanda eduksistemo estas konsiderata kiel la plej bona en Eŭropo, eble eĉ pli vaste. Kial? En Finnlando ne estas privataj lernejoj - jes, kelkaj lernejoj apartenas al privatuloj , sed ili ricevas la saman financan helpon de la registaro kaj devas sekvi la samajn programojn , praktike ne estas diferenco. Do estas ĉies intereso ke ĉiu lernejo provizu same bonan edukadon al ĉiuj.

Estas multe pli por diri rilate la tipon de socio kreitan per funde malegala eduksistemo kiel ekis montri Marcel. Sed tiuj linioj estas nur rapida reago al la paroloj de instruisto, Marc Schmidt , ne eseo. *Franciska Toubale*



**El Brizbano** BES-membro Linda Danzer organizis Internacian Virinan Tagon en Caboolture en la nordo de Brizbano. Bildoj montras ŝin kaj gastojn. Linda servis manĝon post la oficiala programo *Petro Danzer*







# El Brizbano

La bona novaĵo por ni en nia parto de la mondo estas ke niaj monataj kunvenoj rekomenciĝos. La monataj kunvenoj de la BES rekomenciĝos. Ili okazos je la lasta dimanĉo de ĉiu monato ekde la 2a horo **escepte oktobro** kiam ĝi okazos je la **17a** de la monato kaj tiam ĝi komenciĝos je la **3a horo**.

La loko estos en la **Brisbane Square Library**, en la **Community Meeting Room**.

Estas limo de 15 ĉeestantoj pro la viruso. Amikajn salutojn. *Doug Eising*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917

# R e v e n a s l a "k o m u n i s t o" - t i m i g i l o .

## ĈU LA TRIA MONDMILITO NECESAS?

Jes, por la "Okcidentaj" privatkapitalismaj kompaniegoj, kun sia centro en Usono, la milito estos necesa, ĉar ili ne povas permesi al si la plifortiĝon de Ĉinujo. Se Ĉinujo fariĝos tro potenca, ekonomie kaj armile, ĝi kapablos ataki, milite, Usonon kaj malutili al ĝi, aŭ/kaj al Kanado, Japanujo, kaj Aŭstralio. La historio instruas nin, ke Usono ĉiam zorgas, ke milito okazu ne sur sia teritorio sed en aliaj landoj. Tial, en sia milito kontraŭ Ĉinujo, ĝi zorgos ke la bataladoj okazu en Japanujo aŭ/kaj Aŭstralio. Mi do anticipas, ke partoj de Aŭstralio detruatos, kiel jam okazis en la Dua Mondmilito. Sed tio okazos nur, antaŭ ol Ĉinujo trovas sin sufiĉe forta. En la kazo ke antaŭ tio Usono komencos la militon, Usono verŝajne uzos Japanujon por unue ataki. Ĉiukaze Usono zorgos, ke amikaj landoj helpos ĝin detrui Ĉinujon kaj ĝian popolon. Aŭstralio povos nenion fari kontraŭ tio, ĉar ĝi estas ligita, sklave, al la usona potenco. Ĝi do devos fari ĉion kion Usono postulos, ĉar la aŭstralia ĉefministro laŭleĝe estas la sola persono kiu povas decidi pri milito kaj armeaj aferoj, kaj la nuna certe obeos siajn militistojn kaj sian sekretan servicon. Do Aŭstralio suferos, sed ne tiom kiom la perdanto, Ĉinujo. En tia milito Rusujo kaj Irano certe ne helpos Usonon, sed la decidoj de la arabaj landoj kaj de pluraj eŭropaj landoj estas necertaj.

Malebligi Usonon komenci militon dependas de la amikaj kaj neŭtralaj landoj, kaj ili estas nia nura espero. *Marcel Leereveld.*

## LA EŬROPAJ ERAROJ .

La eŭropaj esperantologoj estas kompreneble tre kleraj, tiom ke oni povas fidi iliajn lingvismajn instruojn pri la gramatiko de Esperanto.

Escepte en la kelkaj kazoj kie la etnaj lingvistoj klarigas sian gramatikon erare. Ke tio okazas, ne estas stranga, ĉar lingvisto de etna lingvo ne povas kompreni sian gramatikon same bone kaj fide kiom lingvisto de alia lingvo kapablas. Tial dum multaj jaroj en la unua duono de la pasinta jarcento la plej klera specialisto pri la angla gramatiko estis lingvisto de Danujo, Otto Jesperson. Lia tekstlibro pri la angla gramatiko estis deviga por studistoj de la angla gramatiko. Ja neanglo pli bone komprenas la anglan gramatikon ol la angloj mem. Tiu fakto plu ekzistas, kaj montriĝas en la nekompreno de kelkaj aspektoj de la anglaj (kaj aliaj) participoj. Oni bezonas neanglon por klare vidi la strukturon de la anglaj participoj. Estas tiuj miskomprenoj kiuj kaŭzas ke la eŭropaj Esperantistoj misuzas la participojn en Esperanto.

La francoj kaj la ĝermanoj (inkl. angloj) lernas en siaj lernejoj kaj universitatoj ke iliaj lingvoj havas du participojn, la prezencan (en "*-ing*") kaj la preteritan (pasintan) (en "*-ed*"). Ili nomas tiujn laŭ la formoj, ne laŭ la funkcioj. Se ili nomus ilin laŭ la funkcioj, la Prezenca Participo uzatas kiel miksaĵo de la Prezenca kaj la Imperfekta aŭ Daŭra. Ĉar jen temas pri miksaĵo kaj jen pri aparta funkcio, utilas nomi ilin ĉiujn "Prezenca/Imperfekta Participo. Sed la t.n. preterita participo havas du tute malsamajn funkciojn, nome kiel Pasinta Participo kaj kiel Pasiva Participo. La eŭropanoj ne sentas tion, nome ke en unu funkcio temas pri pasinta aktivvoĉa ago kaj en alia funkcio samforma temas pri nur pasiva ago, sen tempindiko, en kiu kazo ĝi do devus nomiĝi la "Pasiva Participo", sentempa. La eŭropanoj ne sentas tion, kaj do la Esperantistoj sentas KAJ prezencan KAJ preteritan tempojn en "*The letter is now (being)*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

*returned*" (La letero nun estas retrosendata). Pro tio la eraroj en Esperanto.
*Marcel Leereveld.*

**HISTORIO RIPETIĜAS .**

Brazilaj farmistoj kaj agrikulturaj kompanioj faras nun la samon en la Amazona regiono de Brazilo kion antaŭ kelkaj jarcentoj faris en Aŭstralio niaj prapatroj, nome ili ĉasas la amazonajn indiĝenojn el iliaj loĝejoj en la arbaroj kaj bruligas la arbarojn, por ŝteli la grundon de la indiĝenoj por uzi ĝin por agrikulturaj okupiĝoj. Sed la brazila krimo estas danĝera por la tuta mondo. *Marcel*.

**RESPONDO AL LA REAGO DE MARC SCHMIDT. .....**

Marc Schmidt reagis al mia artikolo kritikanta la sistemon de privataj lernejoj precipaj por la riĉa superklaso. Post legi tiun reagon mi ne povis ŝanĝi eĉ la plej etan parton de miaj ideoj pri la temo. Ĉu Marc lernis ion el mia artikolo? Evidente ne. Ni tamen povas resti bonaj amikoj kaj bonaj Esperantistoj.

Lia reago konsistas el du partoj. En la unua parto li provas montri, ke homoj malŝatantaj la privilegian sistemon de privataj lernejoj estas komunistoj. Li enkondukas en la diskuton politikan dimension ne intencitan nek rilatan. La eŭropaj landoj jam dum jarcentoj konis, favoris, aŭ enkondukis universalan, nepolitikan, devigan edukadon egalan por ĉiuj infanoj, same kiel ili enkondukis ĝeneralan sanoprizorgadon, imposton kaj sekurecon, ĉiujn samajn por ĉiuj ŝtatanoj. La Komunista Manifesto lernis el tio, sed ankaŭ kapitalismaj socioj lernis de tio. Do estas stranga nomi tiujn ideojn "komunistaj". La uzo de falsa malkredindigado per la vorto "komunisto" okazadis dum la tempo de Menzies, kiu ĉe parlamentaj elektoj false timigis la homojn dirante ke la komunistoj estis invadintaj la Laborpartion kaj post la elektoj regos Aŭstralion se li ne estos venkanta. Tiu fabelo sukcesis kaj li venkis plurfoje, kvankam en tiu tempo la aŭstraliaj komunistoj estis sufiĉe demokrataj kaj sendanĝeraj. Samtimige aperas la komunisto-avertoj de Marc, kaj ĉi tio estas la unua fojo ke mi vidis en A. E. tian politikan kalumniadon, nomi la tre multajn nekomunistojn "komunistoj" se ili malŝatas privatajn lernejojn. Cetere la "komunistoj" en Lenin-Rusujo, en Stalin-Rusujo, kaj nun en Ĉinujo havis specialajn privilegiajn lernejojn por la infanoj de siaj superklasoj; ĉu tial mi devas kalumnie nomi Marc'on "komunisto"?

En la dua parto de lia reago li surtelerigas (dishes up) la kutimajn defendojn de tiuj kiuj vivas kaj uzas la privatajn lernejojn per sensencaj argumentoj, ekzemple la fabelo ke la registaro bezonas la privatajn lernejojn ĉar ĝi ne havas la lernejojn; ĉu la registaro devas konstrui kaj reteni malplenaj lernejojn por la tempo kiam la privataj lernejoj forsendos siajn lernantojn, kiujn ĉi lastajn la privataj ege forte altiras al sia sistemo per reklamoj? Ĉu la eŭropaj registaroj ne povis konstrui la necesajn lernejojn por siaj multegaj lernantoj? En la grandaj urboj de Aŭstralio estas nur du aŭ tri senpage akceptataj lernantoj, kaj ne la mezinteligentaj de ili. *Marcel Leereveld.*

# 3ZZZ



La elsendo de la 8a de marto informas pri Afriko kaj pri la ĉeĥa kutimo sin bani en la malvarmega akvo de la rivero Moldavo *Franciska Toubale*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***